# La Flandra Movado.

**klarigata al la partoprenantoj de la XXa Universala Esperanto Kongreso en Antwerpen.**

**(3a - 11a de Aŭgusto 1928)**

ELDONO DE
FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA
ALIGHINTA AL
HET VLAAMSCHE FRONT, P. V. N.
(LA FLANDRA FRONTO)
(Partio de Flandraj Nacionalistoj)

# La Flandra Movado.

**klarigata al la partoprenantoj de la XXa Universala Esperanto Kongreso en Antwerpen.**

**(3a - 11a de Aùgusto 1928)**

Kelkaj esperantistaj amikoj el la eksterlando estis tiel saĝaj antaŭe informiĝi pri urbo, popolo kaj lando, kie ĉi tiun jaron okazas la universala kongreso. Ili demandis al ni havigi al ili ĉi tiujn informojn.

Ĉi tio konjektigis nin, ke pli multe da esperantistoj estas same scivolemaj.

Kiam Ŝia princina Moŝto Astrid, edziniĝinta kun la Belga kronprinco, alvenis en Antverpeno, oni transdonis al ŝi deklaron, kiu krom al ŝi, volis paroli ne nur al la Sveda popolo, al kiu ŝi apartenis, sed ankaŭ al la civilizita mondo, kies atento estis je tiu momento fiksita sur Belgujo.

En ĉi tiu deklaro oni klopodis skizi kompletan bildon de tio, kion oni nomas la Flandra Movado. Ni opinias, ke ĉi tiu deklaro, laŭ siaj esencaj partoj, estas ankoraŭ nun preciza informilo pri la situacio en kiu la Flandra popolo nuntempe troviĝas.

Vi, esperantistoj, respektas la naciajn lingvojn, sed volas uzigi universalan mondlingvon, kiu plifaciligas la interrilatojn inter la popoloj. Vi interesiĝas pri lingvaj aferoj. Se vi aŭskultas en Antverpeno, vi aŭdos ĉie paroli flandran. Vi komprenebIe ankaŭ aŭdos de tempo al tempo francan, anglan, germanan: kiel mondhaveno Antverpeno estas tre kosmopolita. Sed la ĝenerala lingvo, tiu kiu enradikiĝas en la pli profundaj klasoj, estas la flandra, dialekte kolorigita formo de la nederlanda, la sama lingvo, kiun vi ankaŭ povas aŭdi en Veurne, Oostende, Ieperen, Brugge, Gent, Aalst, Mechelen, en la popolaj kvartaloj de Bruselo kaj sude de Bruselo, en Leuven, Maaseik, Hasselt, ĝis je malmulte da kilometroj de Luik. Estas la lingvo de dekkvar

milionoj da estuloj en Flandrujo, Holando, Sud-Afriko kaj Nederlanda Indio.

Oni riproĉis al ni, ke ni enŝlosas nin kun ĉi tiu lingvo interne de ĉina muro. Se ĉi tio estus vera, oni povus diri la samon de la Danoj, Svedoj, Norvegoj, Ĉeĥoj, Hungaroj, Portugaloj kaj multe da aliaj populoj, kies lingva regiono eĉ ne etendiĝas je dekkvar milionoj da estuloj. Tiuj, kiuj faras ĉi tiun riproĉon al ni, estas en nia lando malgranda malplimulto, la riĉa burĝaro, kiu bedaŭrinde per sia socia posicio ĝis nun havis grandan kaj de nacia vidpunkto malbonan influon sur la regado de la lando. Ili estas de Flandra deveno kaj havas plejofte Flandrajn nomojn.

Sed ili lernis paroli francan, - francan, pri kiu oni en Parizo jam kelkfoje ŝercis. Ili rigardas kiel sia devo tiamaniere izoligi sin de sia popolo per la uzado de fremda lingvo, por pli bone vidigi, ke ili apartenas al pli bona socia klaso. Estas ili, kiuj izoligas sin. Estas ili kiuj ĉirkaŭas sin per Ĉina muro.

Anstataŭ izoligi sin meze de la Eŭropa kulturo, la Flandra volas enigi sin en la Eŭropan. Fama Flandra verkisto kaj kritikisto, prof. Dr. A. Vermeylen, iam deklaris : „Ni volas esti Flandroj por iĝi Eŭropanoj." Ĉi tio estas ja trafa vero. Estas precize la Flandremuloj, kiuj unue montris la pli grandan intereson por la spiritaj fluoj en la kulturlandoj. Tradukoj de August Strindberg, Ellen Key, Selma Lagerlöf, Frederika Bremer, Esaias Tegner, Victor Rydberg, Verder von Heidenstamm, Oscar Levertin, Gustav af Geyerstam, k. a. estis avide legataj en Flandrujo kaj multaj paroladoj kaj legadoj estis okazintaj pri la Sveda literaturo, longe antaŭ kiam oni ekatentis en Valonujo pri ĝi. La tre talenta mortinta S - ino Logeman - Van der Willigen, kiu pasigis grandan parton de sia vivo en Gent, daŭre eldonigis tradukojn el la Sveda kaj tiel faris bonegan vulgarizacian laboron.

Svedujo estis fine por ni pli ol ekzemplo : estis argumento. En la batalo por la nacia rajto de kvar milionoj da Flandroj, la Flandraj kondukantoj neniam preterlasis atentigi pri la alta grado de civilizacio, kiun ĉiuj Skandinavaj popoloj atingis, speciale la Sveda, kiu laŭnombre ne estanta multe pli forta ol nia, tamen

akiris kaj konservis propran pozicion meze de la Eŭropa kulturo, sen cedi pro tio kiom malmulte ajn de sia propra karaktero, de sia propra lingvo.

Kio estas ĉi supre deklarita pri la Sveda literaturo, estas ankaŭ vera pri la Norvega, Dana, Rusa, Germana, Angla kaj estas ankaŭ vera pri la Franca.

Multaj el vi, esperantistoj, estis verŝajne ĝis nun inklinaj por rigardi la loĝantaron de Belgujo kiel homogenan tuton, unu kaj nedisigeblan, ĉar estas nur unu sola leĝodona kaj rega potenco en tuta Belgujo.

Tamen, kvankam Belgujo ekzistas, ne ekzistas ja Belgoj. La Valona parlementano Destrée, poste iĝinta ministro, iam prave skribis en letero al la reĝo: „Sire, il n' y a pas de Belges". („Reĝa Moŝto, ne ekzistas Belgoj"). Kaj la reĝo mem, kiam li en 1914 kunvokis siajn soldatojn por batali kaj klopodis trafi la impreseblan flankon, ne alvokis Belgojn, sed Valonojn kaj Flandrojn.

Ĉiu, kiu travojaĝas Belgujon je nord-suda direkto, tuj povas konstati, ke ĝi konsistas el du diversaj regionoj, ĉiu kun propra lingvo - la Valona kaj la Flandra aŭ pli bone Nederlanda - respektive apartenantaj al la Romana kaj Germana lingvogrupo.

Estas sendiskuta fakto, ke du popoloj, Valonoj kaj Flandroj, vivas en Belgujo, disigitaj per lingvolimo, kiu restis depost 1400 jaroj preskaŭ sensanĝa.

Ne tuj estas tamen komprenata la akra kontraŭtezo, kiu ekzistas inter la intereso de la Flandra popolo kaj tiu de la Belga ŝtato.

Erariga eĉ por fremdulo estas la fakto, ke tiu kontraŭtezo neniam okazigis sangajn konfliktojn, kiuj altiras la atenton de la mondopinio. Tamen ĉiu scias laŭ la akirita sperto okaze de la disiĝo de Svedujo kaj Norvegujo, ke estas cirkonstancoj en kiuj popolo, ankaŭ sen sanga revolucio, povas sin elŝiri el ŝtatunuiĝo, se ĝi energie kaj persiste klopodas por realigi sian celon. Ekzistis fortegaj rilatoj inter la Norvegoj kaj la Svedoj, estis inter ili pli malmulte da kaŭzoj por malkompreniĝo ol inter la Fandroj kaj la Valonoj.

Plie, se la ekzistantaj rilatoj inter Flandroj kaj Valonoj ne jam okazigis perfortajn agojn, kiel aludite supre, estas ĉar tiu malbona interrilato estas tute kaj treege profitdona al la Valonoj kaj ĉar la viktimoj, la subprematoj - la Flandroj - estas precipe indulgaj, ordemaj laŭ naturo kaj ne jam memkonsciaj, malgraŭ la multaj tragediaj situacioj, kiujn travivigis al ili la nekonstanteco de la historiaj okazintaĵoj.

La Valonoj kontraŭe estas multe pli viglaj kaj eksciteblaj laŭ naturo. La socialismo ekzemple pli rapide kaj profunde enradikiĝis en Valonujo ol en Flandrujo, kie la katolika mondkoncepto kaj spirito estas multe pli intime ligataj al la vivo. La Valonoj kelkfoje ja deklaris, ke ili ne tolerus dum dudekkvar horoj la staton, kiun la Flandroj devas toleri. Kaj kiam nur ŝajne ekzistis danĝeron, ke ili perdu la superregadon, iliaj oficialaj reprezentantoj eligis la revolucian krion, pli trafe kaj minace ol la Flandroj ĝis tiam provis fari.

Ni ne volas aserti, ke la Flandra popolo ne estas kapabla kaj preta por perforta ribelo. Oni ne forgesu, ke eĉ la katolika filozofio en kelkaj okazoj akceptas, kiel permesata la perarmilan kontraŭstaron kontraŭ maljusteco. Montriĝis lasttempe signoj, kiuj vidigas, ke la Flandra popolo ekpensas al tia revolucia kantraŭstaro. La batalmetodo de la lastaj jaroj celis precipe la formadon de la Flandra karaktero, la kontraŭbatalon de la hezitemo kaj la inciton de la iniciativo, energio, memkonfido, memagemo, sendependa spirito kaj popolfiero de la Flandroj. Kaj estas sendube, ke - se katastrofo de nova milito en Eŭropo ekaperus - en Flandrujo naskiĝus nova aktivismo, multe pli potenca kaj decida ol tiu de 1914-1918.

Sed dum la sinsekvo de la jarcentoj, la historiaj cirkonstancoj bedaŭrinde igis la Flandran popolon en staton de morala dekadenco, de spirita apatio, de senkonscio, de senvolemo, kiu preskaŭ ne plu havis ion komunan kun nacia vivo.

Flandrujo tamen estis iam alportinta riĉan parton al la okcident-Eŭropa kulturtrezoro kaj se estas vere kion diras Irlanda poeto, ke ,,kulturoj estas esprimoj de la animo kaj

karaktero de la la popoloj, ke ili estas majestaj aŭ sengloraj, laŭ la trezoro de beleco, imago, volo kaj ideoj, kiu estas kaŝita en la animo de popolo", tiam la Flandra popolo distingiĝis per granda animo, forta karaktero.

Pri la pozitiva entreprenspirito de la Flandra popolo atestas Dante en sia „Divina Comedia". Pri ĝia spirito de libereco parolas la tuta historio de la 11a ĝis la 16a jarcento. Ĝian laborkapablon garantias la riĉeco de ĝiaj urboj, Ieperen, Brugge Gent, Antwerpen, Brussel, per monumentoj de ilia belega, maltimema konstruarto. Ĝia popolpotenco estis tiel forta, ĝia vivoĝojo tiel granda, ke ĝi trovis preĝejarkaĵojn tro malaltaj kaj orgenoj tro mallaŭtaj por jubili pri la abundeco de sia popolanimo. Ĝi tial konstruis turojn kaj faris sonorilarojn por elŝuti sur tutan urbon la esprimojn de tiu ĝojo.

Memling, Van Eyck, Breugel, Rubens, Hadewich estas nomoj, kiuj vidigas ravajn vizionojn.

Ke la Flandroj el tiu ora tempo ankaŭ posedis rasfieregon, oni povas konstati en Stockholm, kie Flandraj tombsurskriboj en la Riddarholmapreĝejo rememorigas, ke elmigrintoj restis fidelaj al sia lingvo ĝis en la morto. Krom tio troviĝas tie ankaŭ en Osterlanggatan malnova renesanca fasado en kiu verso estas skulptita, kiu elspiras la sobran, Flandran popolsaĝecon : „Zijt gij rijk, gij hebt veel vrienden ; wordt gij arm, wie kan ze vinden." (Kiam vi riĉa estas, vi havas multajn amikojn ; kiam vi malriĉiĝas, kiu povas trovi ilin ?")

Ne unu sed kvar orajn jarcentojn Flandrujo travivis. Sed poste sekvis ja tri, preskaŭ kvar jarcentoj de malfeliĉego. En la 16a jarcento komencis la fremda superregado kaj tiuj, kiuj ne volis toleri la Hispanan jugon, granda parto de la kondukanta rango, la artistoj, la kleruloj, unuvorte la kulturalportantoj rifuĝis en la nordon, kun la fatala sekvo por la granda aro de la simpla popolo : spirita kaj morala dekadenco, kultura malriĉeco, malrapida fremdnaciiĝo.

En la 17a jarcento Flandrujo profunde estis trafata per la

forrabo de Duinkerken, Rijsel kaj Robaais kun la ĉirkaŭa prospera regiono.

La 18a jarcento estas jarcento de malantaŭeniĝo, en kiu preskaŭ ne estas parolata pri Flandrujo. Nur en la dua duono aperis signoj de reviviĝo kun Vonck kaj Van der Noot, du Flandroj, kiuj provis kontraŭstari la Aŭstrujan reformemon, kontraŭan al la naciaj tradicioj.

La Franca okupado tamen estas la fatala periodo. Ankoraŭ vivas la Flandra fiereco. Okazis, ke la popolo rifuzis tradukigi la Francajn proklamojn de generalo Dumouriez, por ne malsanktigi sian nacian lingvon, „nian flandran lingvon", kiel estis dirite. Kamparana ribelo estis sufokita en sango. Advokato, publikigisto, Verlooy, intertempe estis skribinta: „Ni ankaŭ lernu nian lingvon! Ni do volonte forlasu tiun fremdan lingvon (la francan), kiu estas tiel malutila al ni, kaj ĉirkaŭbraku la nian; ni fine sekvu tiel la feliĉajn ekzemplojn de preskaŭ ĉiuj landoj en Eŭropo. Francujo, Anglujo, Italujo, Hispanujo, Germanujo, Svedujo, antaŭ nelonge antaŭzorgis por la sia kaj ankaŭ Rusujo, nelonge antaŭe. Se do miaj samlandanoj ne estas dronintaj en eksterordinaran stultecon, ni forlasu la Francan kaj rehonoru kaj reestimu la Nederlandan lingvon."

Sed tiun fortegan francigadon dum la Napoleona reĝimo Flandrujo ne povis kontraŭstari. La kolektado de rekrutoj, la cenzuro, la subpremo de la libera penso kaj la politika persekutado estis sisteme organizitaj. Fine la popolo tiel alkutimiĝis al tiu sklaveco, ke ĝi karakteriziĝas per la plej sklava malnobleco. Estas tiam, ke tiuj senkarakteruloj, kiuj iĝis la pioniroj de la nuna Francemuloj, montriĝas blindaj servantaĉoj de fremda reĝimo, flatantaĉoj de fremdaj tiranoj, almoze favorpetantoj, malkonfesantoj de sia prapra lingvo, de sia deveno, de sia propra Flandra nomo.

Tamen, tuj post la falo de Napo leono, la Flandra konscio revekiĝis ĉar estis tuj sendata al la Aŭstra landguberniestro en Bruselo petskribo, subskribita de 9 ĉefdekanoj kaj 150 dekanoj de la

korporacioj, per kiu estis petata rerajtigo de la Flandra landlingvo kiel antaŭe.

De 1814 ĝis 1830 Flandrujo dum mallonga tempo reekspiris, reviviĝis kaj reesperis sekve de la fondiĝo de la Nederlanda Reĝlando, kiu eble iam estus iĝonta la plej bela lando, kun urboj kiel Brussel, Gent, Brugge, Antwerpen, Rotterdam, Den Haag, Amsterdam, Utrecht, Groningen, Leeuwarden. Du vidindaj mondurboj Amsterdam kaj Brussel; du el la plej grandaj havenoj, Antwerpen kaj Rotterdam, en unu ŝtatunueco. La lando de Rembrandt kaj Rubens samtempe.

La Francaj intrigoj kaj landmalsato, kiujn oni ĉiam retrovas tra la tnta historio de la Flandra popolo, helpataj de aventnristoj, servataj de la mallerteco de Willem I, reĝo de la Nederlandoj, detruis tiun realigon. La revolucio de 1830 - burleskaĵo kun serioza fino - enkondukis malrekte denove la reĝimon de la intensa fremdnaciigo. Tiu reĝimo tre klare estas karakterizita per la deklaro de Charles Rogier, la ĉefa pioniro de la revolucio, kiu skribis :

„Les efforts de notre gouvernement doivent tendre à la „destruction de la langue flamande, pour préparer la fusion de „la Belgique avec notre grande patrie la France. Les premiers „principes d' une bonne administration sont basés sur l' emploi „exclusif d' une langue, et il est évident que la seule langue des „Belges doit être le français. Pour arriver à ce résultat, il est „nécessaire que toutes les fonctions soient confiées à des „Wallons et à des Luxemburgois : de cette manière les Flamands „privés temporairement des avantages attachés à ces emplois, „seront contraints d' apprendre le français et l' on détruira ainsi „pue à peu l' élément germanique en Belgique."

(„La klopodoj de nia registaro devas celi la malaperigon de la Flandra lingvo por pretigi la kunigon de Belgujo kun nia granda patrujo, Francujo. La ĉefaj principoj de bona administracio estas bazitaj sur la nura uzado de unu lingvo kaj estas kompreneble ke la nura lingvo de la Belgoj devas esti la Franca. Por atingi tiun rezulton estas necese, ke ĉiuj oficoj estu aljuĝataj al Valonoj kaj

al Luksemburganoj ; tiamaniere, la Flandroj, tempe forigataj de la favoroj de tiuj funkcioj, estos devigataj lerni la francan lingvon kaj tiamaniere oni detruos iom post iom la Germanan elementon en Belgujo.")

Sekve de tiuj ordonoj, la armeo, la juĝistaro, la administracio, la instruado estis tute francigataj en Flandrujo. Flandra ĵurnalisto do tre prave povis skribi, ke en nia lando popolo estas mortigata. Tamen estas tiu sama popolo, kiu akiris rajton je memregado per sia glora estinto.

Estas tiu politiko de Rogier, kiu havigis al la Valonoj la monopolon de la civilaj kaj militaj oficoj kaj kiu tiamaniere donacis al ili politikan influon, similan al forta kapitalo, kiu nuntempe iom estas ŝanĝinta laŭekstere, sed senŝanĝa restis interne. Ĝi naskis en Flandrujo mem Francigan spiriton, kiu ne nur kaptis la oficistaron, sed ankaŭ la grandkomercistojn kaj industriistojn, la sociajn klasojn, kiuj havas potencan influon.

Estas tiuj ĉi Francigitaj Flandroj, tiuj ĉi Francemuloj kiuj, kunlaborante kun la Valonoj, gardas siajn privilegiojn kaj kiuj, kvankam estante pli malmultnombre, subpremas la Flandran popolon. Oni diras, ke la Flandroj estas damnitaj restadi duarangaj civitanoj en Belgujo. Intertempe, la Franca tradicio firme persistas. Pli ol antaŭ la milito, la eksterlanda Belga politiko estas direktita laŭ Franca ekzemplo. Kun tiu lando oni eĉ konkludis militan kontrakton, pri kiu la Belga registaro kvietige deklaris, ke ĝi estas pure teknika kaj defenda, kvalito aljuĝata de la koncernaj ŝtatoj antaŭ 1914 al la kontraktoj, kiuj kaŭzis la mondmiliton.

Tiu ĉi politiko, gvidata laŭ Pariza ekzemple, pravigas la vortojn de la iama ministro Kam. Huysmans, ke Belgujo nur estas filio de Francujo.

Se la Flandra popolo, kontraŭ sia propra nacia intereso kunhelpis al la aventuro de 1830, estas precipe ĉar, kiel ni jam antaŭe skribis, dum la centjara subpremiĝo ĝia politika komprenkapablo, same kiel ĝia nacia konscio, malvigliĝis kaj ĉar ĝi iom post iom alkutimiĝis al tiu malrapida degenerado.

Sed tuj post 1830 kontraŭagado ekkomencis kaj lingva movado

naskiĝis - efektive, tio nekontraŭdireble jam estis fakte naciona-lista movado - kies programo estas resumita en la devizo : Flandra en Flandrujo. La kvar ĉefaj punktoj de tiu programo estis : Flandra en la administracio! Flandra en la juĝejoj ! Flandra en la armeo ! Flandra en la instruado !

Per tiuj ĉi postuloj montriĝis unuafoje la forta volo de la Flandra popolo je kontraŭstaro kaj estis formata tiu konscio, kiu poste tre trafe estis nomata : Hejmveo al patrujo.

La Flandra movado depost tiam kaŭzis gravan bonstaton de la Flandra arto, i. a. de la literaturo kaj de la muziko: Conscience, Gezelle, Rodenbach, Pol de Mont, Streuvels, Declercq, Buysse, Timmermans, Baekelmans, Vermeylen, Teirlinck. Benoit, Waelput, Gilson, Alpaerts, Mortelmans, Van Hoof, Veremans estas rimarkindaj majstroj inter la literaturistoj kaj komponistoj kaj kelkaj estas ankaŭ jam konataj ekster la landlimoj.

Tiuj ĉi spiritaj ĉefuloj estis fortaj kreintoj. Majstroj kiel Conscience kaj Benoit estis dum sia vivo vere portataj sur la brakoj de tuta popolo. La Flandra konscio vekiĝis sub ilia instigo en la diversaj klasoj de la Flandra popolo. Ĉiuflanke la Flandroj montris sian firman volon esti si mem. Per la plej grandaj foroferoj ili sukcesis starigi kaj vivigi: Nederlandajn Teatrojn en Antwerpen, Brussel kaj Gent ; Flandran Operejon kaj Flandran Konservatorion en Antwerpen ; Flandran Popolteatron, Flandran Turistan Grupon, Flandran Ekonomian Unuiĝon, Flandrajn Sciencajn Kongresojn, Flandrajn Bankojn kaj Asekurajn Firmojn.

Pli kaj pli forte la Flandraj rajtpostuloj estis esprimataj i. a. dum la batalo por la Flandrigo de unu el la du ŝtataj Universitatoj, tiu el Gent, batalo kiu intertempe estis ridinde solvata je nenies kontento.

Oni povas diri, ke en Belgujo ĉiu sana solvo de efika politika, socia, ekonoma, kultura demando iĝas neebla pro la Flandra nacionalista problemo. Kaj tial la Belga ŝtato pli kaj pli senfundamentiĝas.

Samtempe kiel la kreskanta Flandra konscio, la nacikoncepto antaŭeniĝis. Kiel ĉiu spirite sana individuo celas la plenan dis-

volviĝon de sia personeco, tiel ĉiu popolo ja celas la plenan disvastiĝon de siaj kapabloj. Preferinde estas, ke kiel individuo popolo ne vivu, ol vivu laŭ fremda ekzemplo, ol kripliĝu laŭ lingvo kaj animo. La batalo por la akiro de ĉi tiu popolindividueco estas la batalo por la akiro de ĝia sendependeco.

Estas ĉi tiu nacilukto, kiun la Flandra popolo travivas depost dekon da jaroj kun granda idealklareco. Kvankam provizore oni ne tro interesiĝas pri la difino de la estonta ŝtato, ĉiuj Flandraj nacionalistoj tamen samopinias, ke Flandrujo devas disponi pri siaj propraj aferoj kaj difini tute sendepende, kiuj estas tiuj aferoj. Ĉi tiu larĝa vidpunkto malfermas por la Flandra popolo vastajn perspektivojn, i. a. ĉi tiun de Grand-Nederlanda Ŝtato ; tiu idealo neniam tute forlasis la Flandrojn kaj inspiris antaŭ duona jarcento belegan muzikan verkon, la oratorion „De Schelde" de Peter Benoit.

Akre montriĝis la batalo por ĉi tiu rajtopostulo dum la milito ĉe l' Yzer-fronto, kie 65 procento de la soldatoj estis Flandroj kaj kie la nombro de la Flandraj mortintoj kaj kripliĝintoj estis 80 procento de la totalo.

Estis por la Flandroj tragika devo militi por la savo de ŝtato, kiu naskiĝis kun la celo ilin submeti kiel popolo, kontraŭ malamiko, kies venko naskus novajn kaj minacantajn danĝerojn por la daŭra ekzistado de la Nederlanda gento.

Per manifestadoj kun revolucia karaktero, per rekta agado la Flandraj soldatoj postulis de la registaro Flandran komandon. Multnombraj estas tiuj, kiuj estis enkarcerigitaj pro tiu postulo aŭ estis senditaj en punkompaniojn. Kelkaj eĉ pasis al la malamika armeo kiel protesto - same kiel la Ĉekaj transkurintoj. Tiel zorgodona estis la situacio por la Belga registaro de Le Hâvre, ke dum Kronkunsido la lan. de Februaro 1918, oni decidis fari gravajn koncesiojn al la Flandroj. Rilate al tio la Reĝo promesis tuj post la milito al la Flandra popolo egalecon rajte kaj fakte kun la Valona popolo sed ĉi tiu promeso restis ĝis nun ne plenumita.

Oni ankaŭ scias, ke la armeestraro travivis kritikan periodon

ĉe l' Yzer-fronto, timante la revolucion de la Flandraj soldatoj, kiuj estis tre malkontentaj pro la humiligoj de oficiroj nesciantaj la Flandran. Unu generalo bataligis eĉ la Flandrajn soldatojn kontraŭ la malamiko tie, kie la pafado estis plej mortiga : en la arbaro de Houthulst. Kaj senhonte li deklaris poste dum politika proceso, ke li tion faris por savi la malhonoron de la Flandraj transkurintoj en sango.

Samtempe kiel la Flandra agado ĉe l' Yzer-fronto, disvastiĝis en la okupita landparto la aktivista movado, kiu sukcesis akiri de la okupanto la Flandran rajtredonon, ĉiam rifuzitan de la Belga registaro.

La aktivistoj, kun kies moralaj instigiloj ni estas solidaraj, estis post la militfino grandnombre ĉu eksoficigataj, ĉu persekutataj, ĉu enkarcerigataj, ĉu komdamnataj, tre ofte je morto. Se la leganto rilate je tio povus tralegi la liston de ĉi tiuj centoj da Flandroj, kiuj estas persekutitaj pro sia konvinko, li konstatus, ke granda nombro el ili estas artistoj, kleruloj aŭ universitatanoj, kiuj nur celis la intereson de sia popolo kaj nur agis pro pure idealaj motivoj. La ministro de l' Juĝopovo Van der Velde devis rekoni, ke la pro sia konvinko punitaj Flandroj estis idealistoj.

Tamen amnestio estis obstine rifuzita al ili kaj al D-ro Borms, la kunbatalanto de ni ĉiuj, kiu nun estas jam dum pli ol naŭ jaroj en la malliberejo kaj donis pruvon de neordinara karaktera forto. Krom tio, neniu grave kondamnita Flandro estis ĝis nun amnestiita.

La rondoj, kiuj influas la ideojn en Flandrujo, tre malkontentiĝis ĉar ĝis nun ne jam estas donita amnestio eĉ ne okaze de tia solena okazintaĵo kiel la edziĝo de Princo Leopoldo de Belgujo, kvankam multaj krimuloj laŭ komuna juro, spionoj, kaj militprofitintoj estis malliberigitaj.

Ni kredas, ke tiu sennoma barbareco estas unika en la politiko de la civilizaciaj landoj. Estas la plej trafa pruvo, ke la Belga registaro intencas daŭrigi la francigan politikon de Rogier kaj, instigata per blinda malamo, tial provas trafi la Flandran popolon en ĝiaj kondukantoj. Belgujo pro tio senkreditigis sin

antaŭ la mondo. Estas do tre komprenebłe, ke la Flandraj nacionalistoj estas firme decidintaj pereigi ŝtaton, kiu trovas siajn fundamentojn en la perfortado de la justeco ka kej ili komencis akran batalon kontraŭ Belgujo.

Eble oni diros al vi, estimataj samideanoj, ke ni, Flandraj nacionalistoj, estas nur reprezentantoj de malplimulto. Sed tie ĉi konvenas tiam la vortoj de Lloyd George : „Malplimulto povas, se ĝi estas firme decidema, altiri la atenton, eksciti la publikan opinion, eduki la popolon kaj krei tiel grandan agitadon en la lando, ke la subtenantoj de la registaro ektimas pro siaj oficoj kaj ekmalkuraĝiĝas. Malplimultoj bone manovrataj, bone kondukataj, kuraĝaj, netimaj, batalemaj kaj neŝanĉeliĝantaj, povas certe influi landon, kiam gravaj aferoj estas decidotaj".

Krom la grupo de tiuj, kiuj estas nomataj Flandraj nacionalistoj, ekzistas alia frakcio de reprezentantoj de Flandroj, kiuj volas akiri la Flandran rajton en la kadro de la nuna centralizita ŝtato kaj tial estas nomataj Flandraj Belgicistoj. Sed estas klare, ke ĉi tiu frakcio ĉiam formas novajn kontingentoj por la Flandra nacionalismo, kvankam ĝi ne konscie celas ĉi tion, kaj la unuiĝo de la Flandra batalo, bazita sur la Flandra nacionalismo, dependas nur de generacioj. Ĉi tiuj Flandraj Belgicistoj bone spertos ke, laŭ parolo de Parnell, neniu rajtas haltigi la antaŭenirado de popolo.

Ĉi tiu deklaracio, samideanoj, kiu per kelkaj paĝoj volas resumi kvincent jarojn da historio de la Flandra popolo, nur povas esti antaŭparolo je pli vasta interkonatiĝo kun batalo je vivo aŭ morto por rajto je Flandra Memstareco.

---

PRESEJO
E. SELE & H. VAN DER MAST
PRINSESSTRAAT. 11
ANTWERPEN